Esperanto

Urbogvidado de Konstanco

La ĝermo de la urbo Konstanco estas kelta fiŝista setlejo, kiu dum la regado de la Romianoj (50 a. Kr. - 400 p. Kr.) atingis armean signifon. Ĉirkaŭ 1215 reĝo *Friedrich II*-a koncesiis al la emerĝanta komunumo la rajton elekti propran konsilion. Dum la jaroj 1414-1418 la mezepoka reform-koncilio okazis ĉi-tie. En 1548 pro la malvenko en la Ŝmalkaldaj militoj Konstanco iĝis antaŭaŭstra, ĝis en 1806 la urbo per la *Pressburg*-a paco venis al Badenio.

① **Turist-Oficejo**
Ĉi-tie je la komenco de la urborondiro vi ricevas ĉiujn informojn pri Konstanco.

② La **ĉefa stacidomo** konstruiĝis 1860-63 kaj per sia novgotika turo rilatas al la gravaj mezepokaj ligoj inter Konstanco kaj Florenco. En la tiea *Palazzo Vecchio* troviĝas murpentraĵo montranta rigardon al Konstanco.

③ La iama ***Heilig-Geist-Bürgerhospital*** (hospitalo por civitanoj / burĝoj "Je l' Sankta Spirito", 1225-1812) kaj iama hotelo *"Krone"* poste estis la ĉefa poŝtoficejo respektive rezidejo *"Tertianum"* por maljunuloj. En la halo de la poŝtejo ankoraŭ troviĝas mezepokaj murpentraĵoj de la tiama konstruaĵo.

④ La iama **ĉefa poŝtoficejo**, konstruita inter 1888 kaj 1891 en la stilo de itala renesanco laŭ koncepto de altranga Berlina oficisto *Kind*, estis transformita en 2001 per aldono de interesaj modernaj arkitekturaj konstru-partoj en ĉef-sidejon de la distrikta ŝparkaso.

⑤ ***Marktstätte***: En la mezepoko nomita *Marktstad*, t.e. ĉe-borda merkato. Vidindaj malfrugotikaj orieloj, tra kiuj oni vendis ekzemple nutraĵojn al la gastejoj "Al ruĝa korbo" kaj "Al aglo" (hodiaŭ banko de komerco). La gastejo "Aglo" estis dokumente menciita jam en 1418. Ĉi-tie loĝis la imperiestro Jozefo II-a (1777) kaj la granda poeto *Johann Wolfgang von Goethe* (1779 kaj 1788 – koncernaj inskriboj troviĝas sur la fasado de la stratangula domo), same la iama reĝino de Holando, *Hortense*, kun ŝia filo Napoleono III-a en la jaroj 1815-16. La ora aglo sur la pinto de la orielo estas donaco de la princo kaj postea imperiestro *Louis Napoleon Bonaparte* kaj rigardas okcidenten al la konata imperiestra rezidejo *Arenenberg* en la svisa kantono *Thurgau*. Ankaŭ la merkatejo, kiu estas turista centro de la urbo, etendiĝas en tiun direkton kaj ĉefe je la norda flanko ofertas rigardon al gotikaj fenestroj.

⑥ La 1897 de *Hans Baur* skulptita puto-monumento ***Kaiserbrunnen*** perdis en la 40-aj jaroj siajn bronzajn figurojn (fanditaj por militaj armiloj). Profesoro *Gernot Rumpf* kreis dum la pasintaj jaroj aliajn kompozaĵojn, kiuj aludas al historiaj eventoj en Konstanco, ekzemple la plurkapa pavo simbolas la fieran katolikan eklezion regitan de tri papoj samtempe dum kelkaj jaroj (preskaŭ neeltenebla stato por tiamaj homoj).

⑦ La domo ***"Zum Rosgarten"*** (ĝardeno de rozoj aŭ eble de ĉevaloj, *Rosgartenstr. 5)* estas la iama gildodomo de la bučistaro, 1324 unue menciita. Nuntempe domicilo de la *Rosgarten*-Muzeo. Speciale vidindaj estas Gildo-Salono, modelo de la mezepoka urbo Konstanco kaj la mineralogia kaj paleontologia sekcioj neŝanĝitaj ekde la 19-a jarcento. Momente la muzeo estas fermita pro restaŭrado.

⑧ ***Dreifaltigkeitskirche*** (Preĝejo de la Sankta Triunuo, *Rosgartenstr.* 25) estis fondita de aŭgustenaj monaĥoj en 1268. La gotika baziliko havas tri navojn. La konstruaĵo danĝere komencis disfali kaj nun ĝi estas funde renovigata. Tial oni ne povas viziti ĝin dum sufiĉe longa tempo. Apude situis sinagogo, kiun detruis la nazioj dum la pogromnokto en 1938.

⑨ ***Hüetlinstrasse*** (iama "*Rossgasse*" [Ĉevala strateto]) menciiĝis unue en 1312 kaj lokigis unu el pluraj Konstancaj banejoj. Sian nomon ĝi ricevis de urbestro *Karl Hüetlin*, kiu oficis inter 1832 kaj 1849 kaj ludis decidan rolon dum la 1848-a revolucio. La sudokcidenta stratangula domo nomiĝas *"Zum Pilgerstab"* ("Al la pilgrimbastono") kaj tiel memorigas la signifon de Konstanco kiel mezepoka pilgrimada centro, sed ankaŭ kiel haltejo survoje al Romo, Jerusalemo aŭ Santiago de Kompostelo. Sude, kie la *Otto-Raggenbass*-Strato eniras, staras la tielnomata "Sveda ŝtono". Ĉi-tie dum la Tridekjara Milito la svedoj sukcese repeliĝis. En la vid-al-vida *Schwedenschanze* la aŭdaca *Hitler*-atencinto *Johann Georg Elser* 1939 kaptiĝis de naziaj ŝtormtrupoj dum provo transpasi la svisan limon.

⑩ ***Schnetz*-pordego** (*Hussenstr.*, maldekstre) estas la malnova urbopordego konstruita en 1381 kaj apartenas al la iamaj urbomuroj.

⑪ ***Hus*-Domo** *(Hussenstr. 64)*
Malalta kaj mallarĝa trabfaka domo el la 15-a/16-a jarcento. Erare oni longtempe rigardis ĝin kiel loĝejon de la bohema reformisto *Johannes Hus*. 1923 aĉetita de la Praga muzea socieo, nun ĝi estas *Hus*-muzeo.

⑫ La **urbodomo** (*Rathaus, Kanzleistr.* 13/15) iam estis la gildodomo de la teksistoj kaj datiĝas de la fino de la 14-a jarcento. Poste ĝi estis latinlernejo. En 1593 la urba arkitekto *Guldinast* donis al ĝi la hodiaŭan formon. Ĝi havas abunde dekoraciitajn arkadojn kaj pitoreskan korton, kie somere okazas koncertoj kaj oper-prezentadoj. La freskoj sur la fasado estas faritaj de *F. Wagner* (1864). La surmur-pentraĵojn en la antaŭa halo (2-a etaĝo) faris prof-ro *Häberlin*.

⑬ **Hotelo *"Barbarossa"*** ("Ruĝbarbo", *Obermarkt 8*)
Jam en 1419 ĝi estis gastejo laŭ arkiva libro; poste fariĝis kunvenejo de patriciaro. La enskribitaj vortoj *"Curta pacis 1183"* (*"Friedenshof"*, "Korto de la paco") rilatas al la Paco de Konstanco kun la lombardaj urboj.

⑭ La domo "***Haus zum hohen Hafen*** (al la alta haveno)" (*Obermarkt* = supra foirejo) estis konstruita ĉ. la jaro 1425. La fasadajn pentraĵojn faris prof-ro *Häberlin* ĉ. 1900, 1970 la domo estis renovigita. Antaŭ tiu-ĉi domo la feŭdo de la Marko Brandenburgio estis transigita al *Frederiko de Zollern* en 1417.

⑮ ***Malhaus*** kaj ***Haus zum Fischgrat*** *(Hussenstr. 2)* unue estis menciitaj en 1293 kiel "pentraĵodomo" (Apoteko ekde la 14-a jarcento) respektive "domo al la fiŝ-osto", kaj kunfandiĝis en la 19-a jarcento. La pompan malfru-renesancan orielon oni transprenis de domo en *Rosgarten*strato. La apuda placo *"Obermarkt"*, ĉirkaŭata de belaj patriciaj domoj, iam estis juĝejo kaj eksekutejo.

⑯ La estinta franciskana monaĥejo (*Stephan*-placo) estis fondita ĉirkaŭ 1250 kaj alikonstruita 1688-1727. En la jaro 1788 ĝi estis dissolvita. Ekde 1818 ĝi estis uzita kiel kazerno, poste kiel urbodomo kaj nun lernejo (*Stephan*-lernejo). Laŭdire 1848 la badena revoluciisto *Friedrich Hecker* proklamis la germanan respublikon de sur tiu balkono. Omaĝe al tio *Johannes Grützke* verkis la buntan frison sur la muro.

⑰ ***Stephan*-preĝejo** (S-ta Stephanplaco) estas romanika kirko starigita 1424-86 en malfrugotika stilo, surloke de estinta sakrala konstruaĵo el la 3-a jarcento. La ĥorejo kun malfrugotikaj vitropentraĵoj datiĝas de 1270. Dum la koncilio la papa tribunalo *("Rota Romana")* ĉi-tie kunvenis. Inter 1527 kaj 1549 la preĝejo estis protestanta (la plej granda parto de la ornamaĵoj detruiĝis), poste denove katolika kaj kelkfoje alikonstruiĝis. Enestas apostolaj figuroj el la apuda franciskana kirko. La plafonaj pentraĵoj de la episkopa korta pentristo *Franz Ludwig Hermann* estiĝis 1770, dum aliaj pentraĵoj en la ĉefa navo datiĝas de 1905. Apude oni trovas aranĝon de belaj burĝaj domoj, inter ili la *Tiergarten*-apoteko, la "Domo al la kavaliro" (1415), al la "Blanka"- kaj "Nigra virkapro" (ĉ. 1425) kaj la domo "al la antaŭa kato", en kiu nun troviĝas la etosoplena vintrinkejo *"Stephan*-kelo". Tut-apude estis judaj kvartaloj, de kiuj tamen ne plu ekzistas spuroj.

⑱ ***Lanzenhof*** (angulo *Laube/Torgasse*) nomiĝis laŭ la svisa gento *Lanz von Liebenfels* (17-a jarcento) kaj estis menciita unue en 1369. Inter 1686 kaj 1698 same kiel inter 1713 kaj 1715 la domo loĝigis la universitaton de Frajburgo.

⑲ ***Lenk*-puto**
Pli ol ok metrojn altas tiu triumfa arko en la mezo de la ĉefa trafika akso. Ĝiaj pli ol 30 skurilaj figuroj satire primokas interalie la aŭtomobilan frenezon de nia socio kaj ankaŭ montras konatojn.

⑳ ***Wessenberg*-domo**
(*Wessenbergstr.*) estas la rezidenco de la lasta dioceza administranto *Ignaz Heinrich de Wessenberg* (mortinta en 1860). Nun ĝi apartenas al la moderna kulturcentro apud la katedralo. Kune kun la kastelo *Arenenberg* ĝi dum la unua duono de la 19-a jarcento estis la plej grava salono en la alemanlingva regiono.

㉑ ***Tiergarten*-Apoteko** (*Wessenbergstr. 28*)
Partoj de la frua mezepoka konstruaĵo troviĝas ankoraŭ subtere. La fasadoj originas el la mezo de la dekoka jarcento. La apoteko estas unu el la plej belaj ekzemploj de urba loĝeja arkitekturo de la baroka epoko en Konstanco.

㉒ **Katedralo "Nia Sinjorino"**
Sur la sama loko de la disfalinta romiana kastelo oni konstruis dum 1052 ĝis 1089 romanikan kolonan bazilikon. La plej malnova parto de la kripto devenas de la fino de 10-a jarcento. En la 14-a jarcento oni alkonstruis al la unue trinava baziliko gotikajn flankajn kapelojn. En 1435 la kapeloj, 1680 la ĉefa navo ricevis volbojn, 1856 estis surmetita la gotika turopiramido. Dum la jarcentoj la katedralo estis riĉe ornamita. La ĥorejon kaj la pordegojn 1453-60 verkis *Haider* kaj *Heinrich Iselin*, 1518 estiĝis la orgensoenejo kaj la renesanca orgeno. La 155 funtocentojn peza "Granda Sonorilo" venas el la laborejo de *Hans Christian Löffler* (1584). 1680 episkopo *Johann Jakob von Fugger* donacis la arĝentan ĉef-altaron, 1775-78 la meza ĥorejo estis gipsita kaj orumita. Okaze de la Konstanca koncilio dum 1414-18 en la katedralo la ekleziaj altranguloj kunsidis. Dumsezone okazas regulaj gvidadoj [Aliĝoj por grupoj kaj lernejaj klasoj ĉe mesoservanto *Konrad Schatz*, tel. 237 52].

- Kripto: konstruaĵo el la 9-a/10-a jarcento, kiu enhavas la kvar originalajn orajn diskojn de la ekstera muro de la ĥorejo. La plej granda parto *"Majestas Domini"* estas unika trezoro de la kristana mondo el la tempo ĉ. 1000.
- Rotondo de Maŭricio: Kiel imitaĵo de la Jerusalema tomba preĝejo , ĉ. 940 konstruita, en ĝia mezo la Sankta Tombo el la 13-a jarcento. De ĉi-tie komencas grandaj pilgrimadoj, ekz. sur la "Ŝvaba vojo" al Santiago de Kompostelo.
- Kruciro: partoj el la 13-a ĝis 15-a jarcentoj
- *Thomas*-, orienta ĥorejo, *Welser*- kaj Konrad-kapeloj, meza navo, enira halo ktp. plenas je pliaj vidindaj trezoroj, kiuj parte nur videblas dum regulaj someraj gvidoj aŭ en akompano de turistoficeja deĵoranto.

㉓ En Koncilio-Strato estas la **urba teatro**. La konstruaĵo el la jaro 1609 servis komence kiel jezuita instruista lernejo, sed ekde 1773 nur kiel teatro.

㉔ ***Niederburg*** (= malalta kastelo) estas la plej antikva kvartalo de Konstanco ĉe la bordo de la rivero Rejno, kiu ĉi-tie elfluas el la granda "Ŝvaba maro".
Tiu kvartalo konsistas el labirintaj mezepokaj stratetoj kaj originalaj burĝaj domoj el la 13-a ĝis 16-a jarcentoj.

㉕ Ĉirkaŭ la jaro 1200 oni konstruis la nordan urbopordegon (**Rejnpordegon**) kiel ŝirmo por la mezepoka ponto.
La **Pulvoturo** apude estis konstruita en 1321 kaj dum kelka tempo funkciis kiel malliberejo. Ĝi estas la nordokcidenta angulo de la fortifikaĵ-muroj tiam ĉirkaŭintaj la urbon, kiuj nuntempe nur montriĝas ĉe la *Schnetz*-pordego.

㉖ Pri la iama **monaĥejo *Petershausen*:**
Estis la intenco de la Konstancaj episkopoj de la 10-a jarcento transformi la propran urbon en spegulan bildon de la urbo Romo. La plej gravaj preĝejoj tial similas al la romaj modeloj.
En la jaro 983 la episkopo *Gebhard II*-a konstruigis benediktanan monaĥejon (Parto de tiu komplekso hodiaŭ servas kiel arkeologia muzeo de la lando Baden-Virtembergo).

Seestrasse invitas al promeno

Fortaj atakoj de la hispana armeo en 1548 kaj okupacioj fare de la svedoj en 1633 kaŭzis gravajn detruojn. Restaŭrado inter 1550 kaj 1630 tamen konservis multajn interesajn arkiteturajn partojn kaj detalojn. En 1802, post la sekularigo, oni vendis la tre valoran bibliotekon, la arkivon kaj la kolekton de naturaĵoj.
De la 19a jarcento ĝis 1977 la tuta areo de la muzeo estis uzita unue de la badena, poste de la germana kaj ekde 1945 de la franca militistaroj kiel kazerna tereno.
En la kvartalo nun ankaŭ troviĝas la urba muziklernejo, administracio de pluraj publikaj instancoj kaj la ĉefa sidejo de la polico.

㉗ La ***"Steigenberger"* Insulhotelo** situas inter la muroj de dominikana monaĥejo fondita en 1235. Ĉi-tie verkis la fama poeto-monaĥo kaj plej konata germanlingva mistikisto *Heinrich Suso (latine por Seuse)*.
En la antaŭa preĝeja navo (nun festhalo) troviĝas riĉaj gotikaj murpentraĵoj, kiuj parte apartenas al la plej malnovaj de sia speco en Eŭropo (antaŭ 1276), ankaŭ tre vidindas mezepoka kruciro [Vizito laŭ interkonsento aŭ aparta gvido de turistoficeja deĵoranto]. En 1785 la monaĥejo ĉesis ekzisti, poste estis instalita banko kaj fabriko produktanta indigon *[Indienne]*; 1838 grafo *Ferdinand von Zeppelin* naskiĝis ĉi-tie. En 1875 oni transformis la konstruaĵojn al hotelo, kiu ricevis en la jaroj 1963-66 abundan niveligon al luksa klaso.

㉘ ***Hohes Haus*** (alta domo, *Zollernstr.*) estas konstruita en 1294 kaj montras la tipajn ogivajn fenestrojn de gotika stilo. Dum la koncilia periodo ĝi gastigis la princon Frederiko de Nurenbergo el la familio de la *Zollern*. La muraj pentraĵoj – kopioj el malfru-mezepoka bildkroniko de geedziĝa kaj fiŝbazara scenoj - estis faritaj de la pentroartisto *Brandes* en 1935.

㉙ La loĝturo **"Al la ora leono"** *(Hohenhausgasse)* estas kvinetaĝa turo por loĝadi, konstruita ĉ. 1450 sub la gvido de katedrala arkitekto *Otto von Rinegg*. De ĉ. 1580 datiĝas la fasadaj pentraĵoj – la plej eminentaj kaj tipaj por tiu-ĉi tempo en Konstanco, verŝajne faritaj de la Konstanca pentristo *Jacob Memberger*.

㉚ La konstruaĵo de la "**Koncilio**" datiĝas de la jaro 1388, kiam oni uzis ĝin kiel grenejon kaj viglan bazaron por tolaj tukoj. De la 8a ĝis la 11a tago de novembro en 1417 tie kunvenis por la lasta konklavo la diversaj katolikaj partioj por finfine elekti kardinalon *Otto Colonna* [Oto Kolona] kiel unuuran papon - papon *Martin* V-a - post plurjaraj gravegaj kvereloj internaciaj. (Koncilio en Konstanco 1414 - 1418). Ekde 1968 ĝi estas moderne ekipita konferencejo.

㉛ ***"Imperia"*** nomiĝas la 9 metrojn alta kaj 18 tunojn peza belulino turniĝanta ekde 1993 sur la havenmuro de Konstanco. Ĝi estas verko de la skulptisto *Peter Lenk*, kiu iomete ruze mokas pri la granda evento "Koncilio": *Imperia* lude tenas en siaj manoj etajn figurojn, kiuj prezentas la papon kaj la imperiestron.

㉜ Ĉe apuda malgranda haveno troviĝas **monumento** honore al *grafo Ferdinand von Zeppelin* [Cepelin] , kiu inventis la aviadon per aerŝipo. La figuro sur la obelisko prezentas la fabelan figuron *Wieland* [Viland] (la forĝisto).

08/2002 Esperanto Konstanz (konstanz.aliaflanko.de) V5c
Kompostis kaj fotis Robert Bogenschneider, dankinde lingve kontrolis Karl Liebermann



Rejno
Webersteig
aliaj direktoj
Spanierstraße
Universitato
Pramo
Mainaustr.
Sternenplatz
Pulvoturo
Rheinsteig
Rejnpordego
Seestraße
Rejnponto
Schotten-platz
Gartenstraße
Untere Laube
Wallgutstraße
Schreibergasse
Konradigasse
Tulengasse
Rheingasse
Inselgasse
Gerichtsgasse
Konstanca Lago
Konzilstraße
Katzgasse
Katedralo
Torgasse
Wessenbergstr.
Hofhalde
Urbo-ĝardeno
Schulstraße
St. Stefans-Platz
Zollernstraße
Sallmannsweilergasse
Obermarkt
Lutherplatz
Paradiesstr.
Münzgasse
Koncilio
Fisch-markt
Obere Laube
Kanzlelstr.
Marktstätte
Haveno
Talgartenstr.
Hussenstraße
Urbodomo
Augustinergasse
Rosgartenstraße
Dammgasse
Bahnhofplatz
Stacidomo
Jaĥthaveno
Bruderturmgasse
Neugasse
Bahnhofstr.
Sigismundstr.
Döbelestraße
Schnetz-Pordego
Bodanstraße
Döbele
Zur Laube
Bodanplatz
Emmishofer Straße
Kreuzlinger Straße
Hüetlinstraße
Sea Life Center
Malgranda Venecio
Emmishof-a dogano
Kreuzlingen-a Dogano
Laga areno
Svislando
Kreuzlingen
Dogano Malgranda Venecio por piedirantoj